N° 1ª.

KOLEKTO « ESPERANTO ».

KONSULOJ

KAJ

ESPERANTO-OFICEJOJ

INFORMOJ PRI LA KREO KAJ ELEKTO DE LA KONSULOJ, ORGANIZO KAJ SERVOJ DE LA KONSULOJ KAJ ESPERANTO-OFICEJOJ, LAŬ LA DECIDOJ DE LA KUNVENOJ DE LA KONSULOJ KAJ DELEGITOJ DE ESPERANTO-OFICEJOJ DUM LA IIIª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

(CAMBRIDGE 1907).

Eldonejo : ESPERANTO

8, Rue Bovy-Lysberg — **Genevo.**

1907.

Donaco de Ob.-Insp. Jakob Dieterich, Reûbei
582/31

N° 1ª.

KOLEKTO « ESPERANTO ».

KONSULOJ

KAJ

ESPERANTO-OFICEJOJ

INFORMOJ PRI LA KREO KAJ ELEKTO DE LA KONSULOJ, ORGANIZO KAJ SERVOJ DE LA KONSULOJ KAJ ESPERANTO-OFICEJOJ, LAŬ LA DECIDOJ DE LA KUNVENOJ DE LA KONSULOJ KAJ DELEGITOJ DE ESPERANTO-OFICEJOJ DUM LA IIIª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. (CAMBRIDGE 1907).

Eldonejo : ESPERANTO

8, Rue Bovy-Lysberg — **Genevo.**

1907.

702761-B. Esp

OSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK
WIEN

ANTAŬPAROLO.

En la Tria Kongreso de Esperanto, en Cambridge, dufoje kunvenis la konsuloj, organizintoj de Esperanto-Oficejoj, informejoj, k. c. En la dua kunveno, oni decidis publikigi broŝureton enhavontan la konkludojn de la raportoj senditaj al Cambridge, kaj de la rilataj pridiskutoj. Plie, oni akceptis la jenan dezirespriman:

« 1e) La Esperantistaj grupoj, societoj, kluboj, k. c., estas petataj instigi en sia loko la kreon de la suprediritaj institucioj, se ili ne jam ekzistas, sekvante laŭeble la ĝeneralan planon priskribotan en baldaŭ aperonta broŝureto.

« 2e) La Esperantistoj kutimiĝu uzi la servojn de tiuj organizaĵoj, kaj instigi la publikon esperantistan kaj neesperantistan, ke ĝi ilin uzu. »

Tiun dezirespriman oni legis, la sekvantan tagon, en la ĝenerala kunveno de la Kongreso, kie ĝi estis favore akceptata.

Ni do resumas en ĉi tiu broŝureto, ĉion, kio estas utila por elekti konsulojn kaj krei Esperanto-Oficejojn laŭ la decidoj de la Cambridge'aj kunvenoj. Plie, ni aldonas ekzemplojn por klarigi, kiel oni povas uzi la priparolitajn organizaĵojn.

La raportintoj:

A. Carles, iniciatinto de la Konsuloj.
H. Hodler, direktoro de « Esperanto ».
S. Meyer, Esperanto-Konsulo en la Rochelle.
Th. Rousseau, iniciatinto de la Esperanto-Oficejoj.

***

Ĉi tiu broŝuro estis tralegita kaj aprobita de S^roj *Ahlberg*, redaktoro de « Esperantisten » (Svedujo); *P. Christaller*, Esperanto-Oficejo, Stuttgart (Germanujo); *N. D. Evstifeieff* (Rusujo); *H. Bolingbroke Mudie*, prezidinto de la IIIa Universala Kongreso de Esperanto (Britujo); *Dro Mybs*, prezidanto de la Germana Esperantista Societo; *Internacia Propagandejo Esperantista* (Britujo); kiuj ĝin varme rekomendas al la atento de la publiko Esperantista kaj de la organizaĵoj Esperantistaj.

KONSULO.

Estas tre dezirinde, ke en ĉiuj urboj, eĉ malgrandaj, ekzistu *Esperanto-Konsulo*.

Rolo de la Konsulo.

1e) La rolo de la Konsulo estas unue honora. Li reprezentas oficiale la esperantistojn de sia urbo en ĉiuj gravaj cirkonstancoj, festoj, kunvenoj, k. a.

2e) Li laŭ sia tuta povo helpas al la fremdaj esperantistoj, kiuj vizitas lian urbon. Ekzemple : iu esperantisto germana alvenas por loĝi en Londono, nesciante aŭ malbone sciante la anglan lingvon, nek konante iun en la urbo. Li vizitas la Konsulon, donas al li rekomendan leteron de la Konsulo de sia urbo. La Londona Konsulo tiam havas la devon kiel eble plej helpi al li ; li prezentos lin al la Londonaj samideanoj en la esperantistaj kunvenoj, rekomendos lin al la personoj, esperantistaj aŭ ne, kiuj povas esti utilaj al li por liaj aferoj. Kiam esperantisto trapasas fremdan urbon, ne vizitante la konsulon, estas ĝentila kutimo lasi por li vizitkarton en la leterkesto de la Esperanto-Konsulo. La Konsulo donas ankoraŭ rekomendajn leterojn al la Esperantistoj de sia urbo, kiuj deziras viziti fremdajn urbojn, kie estas Esperanto-Konsulo.

3e) Li sin okupas precipe pri ĉiuj praktikaj aplikaĵoj de Esperanto. Li estas parola kaj skriba tradukisto inter la esperantista kaj la neesperantista publiko. Li respondas al ĉiuj leteroj, per kiuj oni petas de li informojn pri turismo, komerco, industrio, k. a.

4e) Li zorgas, ke neniu kreu entreprenon, kiu uzos la nomon Esperanto, se la entrepreno ne estas honesta kaj fidinda ; se tio okazus, li devas informi la Esperantistaron, ke tiu entrepreno estas absolute privata afero kaj neniel rekomendata de li.

5e) Li penas trovi en la urbetoj kaj vilaĝoj de sia regiono korespondantojn (subkonsulojn), al kiuj li povas sin turni por informoj kaj resendi la fremdulojn.

Elekto de la Konsulo.

Pro sia rolo, la Konsulo devas laŭeble plenumi la kondiĉojn sekvantajn :

1e) Li devas esti persono de bona situacio sociala kaj, tre multe super la suspekto, ke li povus tiri ian profiton de la rolo, kiun li akceptis. Li devas havi multajn rilatojn en la societo loka, konatojn, influojn, tre ofte utilegajn, k. t. p. Kompreneble ĉio tio ĉi estas proporcia kun la graveco de la urbo kaj de la lando.

2e) Li devas esti enlandulo. Nenio estas pli malbona ol la impreso, kiu rezultas de afero kondukata de fremdulo.

3e) Li ne devas esti politika persono, nek militanta en ia partio politika aŭ religia, ĉar tio povus tre malhelpi nian aferon.

4e) La Konsulo devas scii la lingvon kaj, memkompreneble, ĝin flue paroli.

Kiel oni vidas, la postuloj estas tiaj, ke nemultaj personoj taŭgas kiel konsuloj. Por doni pli da oficialigo kaj solenigo al la elekto de la Konsulo oni povas lin baloti en ĝenerala kunveno de ĉiuj esperantistoj de la regiono aŭ per korespondado. (1)

Oni kelkafoje diris, ke konsulo devas havi blazonŝildon ĉe sia pordo. Pri tio oni devas esti singardema. Kelkaj personoj tute prave rimarkigis, ke Esperanto ne estas nuntempe

---

(1) En la urboj, kie estas nur unu esperantista societo, la prezidanto de tiu societo, kiam li bone scias Esperanton, plej ofte taŭgas por tiu ĉi rolo. En la urboj, eĉ grandaj, estas tre dezirinde, ke ĉiuj esperantistoj interkonsentu por elekto de unu sola Konsulo.

sufiĉe fortika, por ke oni povu meti la Esperanto-Konsulon sur la rangon de la naciaj konsuloj, kaj ke, farante tion, eble oni ridindigus nian aferon. Oni pri tio agu laŭ la lokaj kondiĉoj.

Esperanto-Oficejo.

La eksperimentoj jam faritaj en multaj urboj pruvis, ke oni ricevas grandan utilon, kreante *ejon*, en kiu oni alcentrigas ĉion, kio koncernas Esperanton. Tiu kreo multe pligrandigis la agadon de ĉiuj esperantistaj aŭ peresperantaj organizaĵoj, grupoj, konsuloj, agentoj, informistoj, k. a., kiuj en kelkaj lokoj nur nome ekzistas. La unua faro de Konsulo devas esti la starigo de tiu ejo, kiu estas *Esperanto-Oficejo.*

A. 1e) Kiel elekti la oficejon?

Ĉar Esperanto ne estas nuntempe sufiĉe potenca, por ke oni povu starigi tute sendependan Esperanto-Oficejon per la mono de la lokaj esperantistaj organizaĵoj, oni fondu la ejon en privata magazeno.

Tiu magazeno estu sur tre konata kaj tre vizitata strato. Ĝi estu absolute neŭtrala politike kaj religie, tiel ke neniu ŝancelos eniri ĝin.

Ĝi estu podetala vendejo. Oni efektive tre ofte konstatis ke:

1e) pograndaj komercistoj malŝatas la ĝis nun ne tre gravajn profitojn donitajn de Esperanto; 2e) ke la preterpasantaj neesperantistoj, kiujn la elmontrado de propagandiloj ekinteresas, timetas eniri gravan magazenon por demandi pri uia afero. Male, en podetalan butikon la publiko volonte eniras por demandi la vendiston, dum ĝi aĉetos bagatelon.

Estas necese, ke en la dirita magazeno oni bonvolu vendi ĉiuspecajn esperantaĵojn, t.e. librojn, ĵurnalojn, poŝtkartojn›

k. c. La magazenoj, kiuj ŝajnas plej taŭgaj, estas la libro-vendejoj podetalaj, poŝtkartvendejoj, ĵurnalvendejoj, kaj, en Francujo, la ŝtataj tabakvendejoj, k. a.

Fine, estas dezirinde, ke la vendisto aŭ iu komizo parolu Esperanton. Tamen, tio ne estas necesega.

2e) *Esperanto-Biblioteko.*

Oni metu en la Esperanto-Oficejo la bibliotekon de la grupo. Kiam oni prunteprenas librojn, oni enskribas la numeron de la libro kontraŭ sia nomo, sur speciala kajero, kaj oni donas kelkajn spesdekojn al la mastro de la magazeno. Oni donu ekzemple 4 sd., el kiuj 2 por la mastro, kiel pagon por lia zorgado, kaj 2 por la grupo, kiu per tiu mono aĉetos novajn librojn kaj bindigos malnovajn.

Tiamaniere oni povas tre facile kaj ĉiuhore pruntepreni libron. Oni konstatis, ke, konsekvence, la esperantaj verkoj estas multe pli legataj, ol kiam la biblioteko estas en la hejmo de iu komitatano de l' grupo, kien oni ne volonte iras, ĉu tial ke oni ne scias precize je kiu horo oni povas renkonti la bibliotekiston, ĉu tial ke oni timos lin ĝeni.

3e) *Esperanto-Vendejo.*

En la Esperanto-Oficejo la publiko povos:

1e) Aĉeti kaj mendi ĉiuspecajn ŝlosilojn, propagandilojn, lernolibrojn, vortarojn, esperantajn verkojn, poŝtkartojn kaj muzikaĵojn.

2e) Aĉeti, mendi ponumere, kaj aboni ĉiujn ĵurnalojn, gazetojn, revuojn esperantajn.

3e) Aĉeti kaj mendi esperantajn signojn, stelojn kaj pinglojn, flagojn k. c., kaj ankaŭ laŭeble esperantistajn komercaĵojn. Pri libroj kaj gazetoj la tenisto de la Esperanto-Oficejo povas sin turni al la eldonistoj, aŭ simple interkonsenti kun esperantistaj librejoj, kiuj konsentas al ili tre kontentigan procenton. Pri la steloj, pingloj k. a., ili sin turnu senpere al la fabrikistoj.

Facile estas kompreni, ke la tenisto ricevas de tio ŝatindan profiton, ĉar :

1e) La esperantistoj kutimiĝas aĉeti en la Esp.-Oficejo ĉiujn librojn, ĵurnalojn, kiujn ili bezonas.

2e) La esperantistoj de la urbo, por helpi al la afero, ne ŝancelas fariĝi klientoj de la magazeno.

3e) La esperantistaj societoj citas ĝin tre ofte en la lokaj ĵurnaloj por sciigi la publikon, ke oni trovos tie ĉiuspecajn informojn kaj propagandilojn.

4e) La preterpasantoj kutimiĝas halti, pro scivolemeco, antaŭ la fenestrego, por rigardi la elmontratajn esperantaĵojn. La publika atento estas do tre altirita al tiu ĉi magazeno, kies mastro ricevas ankaŭ de tio peran profiton.

4e) Afiŝejo.

Post kelka tempo, la tenisto tre bone komprenas tion, kaj oni tiam povas sukcese peti de li la permeson, afiŝi en la fenestrego, sur kartono aŭ kadro, videbla de ekstere, ĉiujn komunikaĵojn al la publiko esperantista aŭ ne: ekzemple, informojn pri kursoj, kunvenoj, esperantaj verkoj ĵus aperintaj kaj aĉeteblaj en la Esperanto-Oficejo, ilustritajn poŝtkartojn kaj fotografaĵojn ricevitajn de malproksime (kiel en la depeŝĉambroj de la ĵurnaloj). Oni afiŝas ankaŭ la gazetajn artikolojn pri Esperanto, kiuj interesos la publikon, petojn de privatuloj, kiuj deziras korespondi, aŭ trovi oficon, aŭ dungi oficiston k. c. (1)

5e) Surskribo.

Fine, oni petu la mastron permesi, ke oni pentrigu sur la fenestrego, supre de la afiŝejo, la vortojn

★ ESPERANTO OFICEJO (2) ★

---

(1) Pri tiu afiŝado oni atentu pri la lokaj leĝoj, kiuj trudas ofte specialan paperon, devigas glui specialajn afiŝmarkojn k. c.

(2) Estas rekomendinde glui en la stacidomo, en la ĉefaj hoteloj, k. c. afiŝon, kiu montras la adreson de la Esperanto-Oficejo. Oni ankaŭ presigu tiun adreson en la lokaj adreslibroj.

6ᵉ) *Komuna adreso.*

Oni informu la poŝtoficistojn, ke ili bonvolu sendi en la Esp.-Oficejon ĉiujn korespondaĵojn direktitajn laŭ la adreso:

Esperanto-Oficejo en X... (nomo de l' urbo).

Por tio oni metu specialan leterkeston en la Esp.-Oficejo. Per tiu maniero, ĉiu persono, kiu deziras skribi al la Konsulo aŭ alia Esperantisto kaj ne konas lian precizan adreson, bezonas nur skribi: *al Esperanto-Oficejo*, *por la Konsulo*, *aŭ por S-ro X...* La Konsulo aŭ lia sekretario sendos la korespondaĵon al la montrita persono.

7ᵉ) *Komuna gazeto.*

Estas dezirinde, ke oni tuj anoncu la elekton de nova Esperanto Konsulo aŭ la kreon de nova Esperanto-Oficejo en speciala internacia gazeto (1), tiamaniere ke oni ne estu devigata legi ĉiujn esperantajn ĵurnalojn por havi la plenan nomaron de la Esperanto-Konsuloj. Same, estas dezirinde ke oni kutimiĝu publikigi en tiu sama gazeto ĉion, kio povas esti utila por la funkciado de la Esperanto-Oficejoj.

Laboro de la Konsulo.

En la malgrandaj urboj, la Konsulo povas tre bone preni sur sin la tutan laboron. Sed, en grandaj urboj, precipe se li estas grava persono, jam tre okupata de siaj propraj aferoj, li bezonos helpantojn. Li mem laŭvole elektos siajn helpantojn, sekretariojn, komizojn, kaj vidos mem, ĉu li

---

(1) La gazeto Esperanto konigas, ke post pago de jara helpabono da 4 Sm. ĉiu Esperanto-Konsulo aŭ ajna Societo aŭ eĉ privatulo povas presigi en la ĵurnalo, sen plia pago, avizojn pri komerco, industrio, turismo, k. c. havantajn karakteron de reklamo por la lando de la helpaboninto. La ĵurnalo ankaŭ akceptas senpage anoncojn privatajn de la helpabonintoj, kiam estas per ĝi petata, ke oni sin turnu al iu anonima societo, grupo, Esperanto-Konsulo, k. c. (ekz. peto pri dungado k. c.).

devas pagi ilin kaj kiom. Cetere, la personoj, kiuj bezonas sciigojn, trovos en la Esperanto-Oficejo folieton aŭ gvidlibron, kiu enhavos la plej urĝajn informojn. Sekve, la tasko de la Konsulo ne postulos tre multe da tempo.

Principe, la servoj farataj de la Konsulo estas senpagaj; tamen, li estas devigata respondi nur la leterojn, kiuj enhavas poŝtmarkojn aŭ poŝtkuponon por la respondo.

Por la informoj, kiuj estas tro precizaj aŭ konfidecaj, oni sin turnu al la specialaj firmoj aŭ agentejoj, ĉu senpere, ĉu per la Konsulo.

Monrimedoj.

En la malgrandaj urboj la Konsulo bezonas absolute nenian monon por la funkciado de la tuta afero, ĉar, almenaŭ en la komenco, li ricevos malmulte da petoj por informoj; li povos facile preni sur sin la korespondan laboron. Cetere, se li bezonas kelke da mono por pentrigi la surskribon sur la fenestrego de la Esperanto-Oficejo, aŭ por presigi leterpaperon, li povos sin turni al la grupa kaso por ĉi tio.

En gravaj urboj, li bezonos monon por pagi sekretarion aŭ komizojn aŭ por fari kelkajn servojn, kiujn ni poste priskribos. Sed, en la komenco, tiuj monrimedoj estas tute ne necesaj, kaj nur post kelka tempo la konsuloj juĝos mem, ĉu ili devas pligrandigi sian kampon de agado laŭ la direkto, kiun ni priskribos en la sekvanta aldono. (1)

---

(1) Oni diris, ke la titolo Konsulo estas malpermesata aŭ neebla en kelkaj landoj. En tiuj landoj oni tre bone povas alpreni alian nomon, ekzemple Delegito, Esperanto-reprezentanto, k. a. Nur ŝajnas necese, kiun ajn nomon ili alprenos, ke:

1e) Ili pentrigu la vortojn : Esperanto-Oficejo sur la fasado de sia ejo.

2e) Ili alprenu la komunan adreson Esperanto-Oficejo en X., tiamaniere ke, ne bezonante ĉiam kunporti la tre ofte variantan adresaron de tiuj organizaĵoj, oni povu senŝancele skribi al ili en kiun ajn urbon, kaj tre facile ilin trovi, kiam oni bezonas ilin viziti.

ALDONO.

Kiel ni supre diris, la rolo de la Konsulo estas enkonduki Esperanton en la vojon de la praktikaj aplikaĵoj, pli ol ĝin senpere propagandi. Li do devas rilatiĝi kun la neesperantistaj komercistoj aŭ industriaj firmoj kaj asocioj, sed anstataŭ diri al iliaj estroj: lernu nian lingvon, li penos havigi al ili novajn klientojn.

Ĉar nuntempe la plej gravaj servoj, kiujn povas fari Esperanto al la komercistoj, estas en la reklama fako, la Konsulo devas kiel eble plej baldaŭ eldonigi folieton, kiun oni disdonos en la Esperanto-Oficejo al la trapasantaj Esperantistoj. Tiu folio nur Esperante redaktata enhavos:

1e) La adreson de la Konsulo kaj la horojn, je kiuj li estas vizitebla.

2e La adresojn de diversprofesiaj personoj (sinjoroj kaj sinjorinoj), kiuj bone scias Esperanton, kaj povas utili kiel buŝaj tradukantoj kaj gvidantoj tra la urbo.

3e) La adresojn de la esperantistaj kluboj, se ekzistas, kaj la horojn je kiuj oni akceptas la fremdulojn.

4e) La adresojn de la esperantistaj komercistoj (hoteloj, restoracioj, kafejoj, apotekistoj, bankistoj, k. a.). En tiu nomaro, oni montras per speciala signo (ekz. la litero P.) tiujn, kiuj parolas Esperanton, kaj ankaŭ per la litero R. la hotelojn, kafejojn, k. a., kie esperantaj gazetoj estas legeblaj.

5e) Kelkajn informojn por viziti la urbon, nomaron de la vidindaĵoj, k. c.

En la komenco sufiĉos presigi nur kelkajn foliojn, eĉ ilin hektografigi. La tre malgrandaj preselspezoj estos pagataj ĉu de la grupo, ĉu per anoncoj.

Pli malfacila, sed treege rekomendinda, estas la eldono de la alloganta *gvidlibro*.

Por trafi bonan rezultaton, oni devas *senpage disdoni* la gvidlibron.

Pri tio zorgos la ĉiulandaj Esperanto-Konsuloj kaj, post antaŭa interkonsento, la sekretarioj de esperantistaj societoj, la organizantoj de esperantistaj ekspozicioj, regionaj aŭ internaciaj kongresoj. La gvidlibro estos ankaŭ ricevebla senpage en la Esperanto-Oficejoj de la regiono, kiun ĝi priskribas.

Estas ankaŭ tre dezirinde, ke la personoj, kiuj ne ricevis gvidlibron dum senpaga pogranda disdonado, povu aĉeti specimenon en la Esp.-Oficejo de sia urbo. Sed, tiuokaze, oni pagu malgrandan prezon, por ke la vendisto ricevu iom da procento. Ankaŭ, oni povu mendi specimenon ĉe la eldoninta Esp.-Konsulo, pagante kelkajn Sd. por la poŝtelspezoj. Oni ne forgesu, ke tiaj gvidlibroj celas tute speciale personojn, kiuj neniam aŭdis pri la lando priskribita en ĝi. Ĝi do estas pli konigilo, allogilo, ol gvidlibro. Ĝi estu kiel eble plej luksa kaj enhavu belajn ilustraĵojn. Oni devas eviti, ke la anoncoj difektu la tekston, kaj pro tio oni ilin presu ĉe la fino. Bone estas enpresi geografian karton maldetalan sed klaran de la priskribita lando. Sed, tro da detaloj pri la vidindaĵoj aŭ praktikaj sciigoj, ekz. sciigoj pri la horoj de la vagonaroj, veturiloj, ŝipoj, k. a. ne estas necesaj, ĉar la plimulto de la personoj, kiuj legos la gvidlibron, ne veturos en la landon, aŭ ĝin vizitos nur post kelke da tempo, kiam la diritaj sciigoj ne plu taŭgos. Nuntempe, la fremduloj, kiuj vizitas urbon, konas la enlandan lingvon kaj uzas la enlandajn gvidlibrojn, aŭ konas nek la enlandan lingvon nek Esperanton kaj uzas la gvidlibrojn, ekz. Bedecker redaktitan per sia propra lingvo.

Kompreneble tia gvidlibro, senpage disdonata, kaŭzas elspezojn sufiĉe gravajn. Por trovi la bezonatan monon la Konsulo povas :

1e) Peti helpmonon de la lokaj societoj por la pliprosperigo de la komerco kaj industrio.

2e) Enpresi anoncojn en la gvidlibro. Por varbi anoncantojn kaj havi presotajn reklamojn, ne estas sufiĉe pres gi

artikolon en la lokaj ĵurnaloj aŭ sendi cirkulerojn. Estas absolute necese, ke oni iru ĉe la komerciston por parole proponi al li la aferon. Oni por tio povas uzi komercan komizon, kiu konas multe da personoj en la urbo, kaj doni al li procenton el la prezo de la reklamo.

3e) Difini specialajn kotizaĵojn pagotajn de la komercistoj, industriistoj k. c., por kiuj la ĉi-sube priskribitaj servoj estas utilaj.

Por tio ĉi oni povas aŭ krei specialan kategorion da anoj en la grupo, aŭ fondi komercistan kaj industriistan sekcion de la grupo (kiel en la Pariza grupo), kies celo estos la uzo de Esperanto por la pliprosperigo de la loka komerco, industrio aŭ turismo. La Konsulo mem juĝos, laŭ la bezonoj, moroj kaj kutimoj de sia lando, kiel li devas organizi la aferon. La anoj de tiu speciala kategorio aŭ de tiu komerca kaj industria sekcio pagos specialan kotizaĵon (ekzemple 1 Sm. ĉiujare), kiu donos al ili la jenajn rajtojn :

1e) Tradukigi Esperanten siajn prospektojn, prezarojn, katalogojn, k. t. p.

2e) Dissendigi kaj disdonigi siajn Esperante redaktitajn prospektojn, prezarojn, katalogojn, k. t. p. fremdlanden, en la esperantistaj kunvenoj, ekspozicioj, kongresoj naciaj kaj internaciaj, kie oni konsentas tion fari (kompreneble ili pagas la poŝtelspezojn).

3e) Enskribigi siajn nomojn en la gvidlibro eldonata de la Konsulo.

4e) Tradukigi esperanten la leterojn, kiujn ili ricevas, esperante skribitajn. ([1])

---

(1) Pri tiu ĉi temo, ni tre atentigas la nefrancojn, pri la imitinda jena organizo starigita de la komerca sekcio de la esperantista pariza grupo. « Kiam nefranca esperantisto volas korespondi Esperante kun iu ajn persono loĝanta en Francujo, kiu ne konas mem Esperanton, li devas unue certiĝi, en kiu departemento kuŝas la urbo de la adresato (departemento estas ĝenerale skribita post nomo de urbo. Ekz. Parizo (Seine), Marseille (Bouches-du-Rhône), Boulogne (Pas de Calais).)

Poste li devos serĉi sur la listo de Franca tradukistaro tiun departe-

5e) Esti montrataj al la personoj, kiuj, leginte la prospektojn, gvidlibrojn k. a. disdonitajn ĉie en la mondo, skribas al la Esperanto-Konsulo por peti informojn.

Aliaj servoj de la Konsulo.

La Konsulo devas respondi ĉiujn leterojn petantajn informojn. Prefere li sendu al la petinto la komercistajn informojn donitajn de la komercistoj mem, ekz., sendante iliajn Esperante redaktitajn katalogojn, prospektojn, k. c. Pri la aliaj, privataj, konfidecaj informoj, li devas esti tre singardema. Sed oni scias, ke ekzistas en multaj urboj firmoj pri tiuj aferoj. Li nur sin turnos al tia firmo, tradukante la leteron de la petinto, kaj prezentante siajn servojn por traduki la respondon Esperanten. Kaj, tial ke li tiel havigos al la firmo novajn klientojn, li petas, ke ĝi aliĝu la komercan sekcion de la grupo kaj ĝin monhelpu. Cetere, jam ekzistas en kelkaj urboj informaj agentoj, kiuj tute private uzas Esperanton kaj siajn esperantistajn rilatojn por doni ĉiuspecajn informojn. Kompreneble, tiaj agentoj bonvolos ankaŭ aliĝi al la grupo kaj la Konsulo nur transdonos al ili la leterojn de la petintoj. Li devas antaŭe sciigi al la petanto la pagon, kiu estos

---

menton, kaj kopii sur unu tradukigilo la nomon kaj adreson, kiuj estas skribitaj post la nomo de tiu deparmento, kaj enmeti la tradukigilon en la koverton samtempe kun sia letero.

Por tiu letertradukado, la adresato devos pagi al la tradukanto 10 sd. per poŝtmarkoj.

Pro tio, ke la poŝtmarkoj de ĉiuj landoj estas akceptataj. la adresanto, kiam li volos ŝparigi tiun elspezon al sia korespondanto, povos enmeti en la letero poŝtmarkojn de sia lando.

Por ĉiaj sciigoj (kaj por ricevi tradukigilojn), sin turni al la komerca kaj industria sekcio de la grupo pariza. Adreso: Esperanto, Rue de l'Arbre Sec, 21 Paris. »

En la urboj, kie estas Esperanto-Konsulo, tiu ĉi estas plej ofte la tradukisto montrata en la listo de la sekcio Pariza.

postulata (1). La Konsulo povas ankaŭ tre helpi al ĉiu persono deziranta dungi komizon aŭ esti dungata. Li konigas la petojn en la esperantistaj kunvenoj kaj ilin afiŝas en la afiŝejo.

La Konsulo ankaŭ tre helpos al la diskonigado de la lokaj komerco kaj industrio, anoncante en la esperantaj gazetoj la gravajn okazantaĵojn en tiu ĉi fako: grandaj internaciaj foiroj, ekspozicioj, konkursoj k. c.

Ĝenerala organizo de la Konsularo.

Jam montriĝis la neceseco de organizo de la tutmondaj Esperanto-Konsuloj. Estas utilege, ke tiu organizo estu kiel eble plej baldaŭ farata. Por tio la jam ekzistantaj Konsuloj kaj tiuj, kiuj estas elektotaj post la apero de tiu broŝuro, estas insiste petataj respondi tre precize la demandaron, kiun ili trovos ĉe la fino de tiu broŝureto, ĝin eltranĉi kaj sendi al la adreso: Esperanto, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève (Svisujo).

Tuj kiam sufiĉa nombro de Konsuloj estos sendintaj sian aliĝon, se eble antaŭ la 1ª de majo, ili estos petataj baloti koresponde provizoran komitaton, kiu prenos sur sin la definitivan efektivigon de tutmonda Esperanto-Konsularo, kiu tre certe havos gravan influon por la enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon.

---

(1) Ni speciale citas la esperantan agentejon por internaciaj komercaj kaj industriaj informoj, fonditan de Sro Duchochois, kaj kiu jam estas tre ŝatata kaj tre uzata de la komercistoj de lia regiono. Por ĉiuj informoj, sin turni al Sro Duchochois, St-Leonard, Boulogne-sur-Mer (Francujo).

EKZEMPLOJ.

Ekz. 1a. Ĉe la Esperanto-Oficejo.

— Sinjoro, mi baldaŭ intencas forveturi Londonon. Ĉu vi havas ĉi tie Esperante redaktitan gvidlibron pri tiu urbo?

— Jes, Sinjoro, tio kostas 50 Sd.

— Dankon... Dum mia foresto, mia edzino kaj miaj infanoj pasigos sian libertempon en Svisujo; ĉu mi povas aĉeti tie ĉi gvidlibron pri Oberlando Berna?

— Jes, Sinjoro, ni havas ĝin ankaŭ; ĝi kostas 20 Sd.

Ekz. 2a. Ĉe la Esperanto-Oficejo.

— Bonan tagon, Sinjoro, mi deziras aĉeti la novan eldonon de la vortaro germana-esperanta.

— Facile, Sinjoro. Ni ne havas ĝin en nia magazeno, sed mi ĝin tuj mendos per nia bonega Esperantista librejo, kaj vi ĝin ricevos post tri tagoj. Ni ĵus ricevis novan eldonaĵon, belan romanon originale verkitan; ĉu vi deziras ĝin vidi? Ankaŭ mi rimarkas, ke vi ne havas verdan pinglon ĉe la vesto. Mi komprenas, ke vi ne ĉiam portas la verdan stelon en nia urbo, sed havu almenaŭ la pingleton de la Frankfurta grupo, tiel ke, kiam fremdaj Esperantistoj vin renkontos sur la strato, ili povu sin turni al vi por bezonataj informoj. Permesu, ke mi donacu unu al vi.

— Dankon, sinjoro... Mi ankaŭ deziras renovigi mian abonon al mia esperantista gazeto; jen 3,20 Sm.

— Bone, Sinjoro; mi sendos vian nomon. Vi sendube scias ankaŭ, ke ĉitiea firmo eldonis belajn ilustritajn poŝtkartojn, kun klarigoj per Esperanto kaj enlanda lingvo. Jen kelkaj specimenoj. Ne forgesu aĉeti kelkajn por sendi al viaj fremdaj korespondantoj.

Ekz. 3a. Ĉe la Esperanto-Oficejo.

— Bonan tagon, Sinjoro. Mi estas fremda Esperantisto kaj mi deziras halti du aŭ tri tagojn en via urbo por viziti la ĉefajn vidindaĵojn. Tial mi permesis al mi veni al via Oficejo, kies adreson mi legis sur afiŝo en la stacidomo, por ricevi kelkajn informojn.

— Sinjoro, ni estas tre feliĉaj ĉiel ajn helpi al fremda samideano, kaj mi deziras al vi plej bonan restadon en nia urbo. Kiel ni povas servi al vi?

— Mi dankas pro via afableco. Mi ĵus alvenas el longa vojaĝo kaj mi dezirus trovi hotelon komfortan, preferinde Esperantistan hotelon, se tio

estas ebla. Poste, mi komencos plezure viziti la plej interesajn monumentojn; min aparte interesas la lernejoj kaj ilia funkciado, ĉar mi estas gimnazia instruisto.

— Jen, Sinjoro, Esperante redaktita gvidlibro pri nia urbo kaj la ĉirkaŭa regiono. Vi trovos en ĝi la nomojn de la hoteloj, ĉe kiuj troviĝas unu persono, kiu parolas Esperante; po 3 Sm. tage, vi havos komfortan ĉambron kaj bonan manĝon. Plie, en ĉi tiu gvidlibro, vi trovos planon de l' urbo kaj priskribon de la plej interesaj monumentoj kun montroj por ĉion vidi en kiel eble plej malmulte da tempo. Se vi bezonas aliajn pli detalajn informojn, ekzemple pri kelksemajna restado en apuda montara vilaĝo, vi povos vin turni al la loka informejo por fremduloj. Ĉar ne jam estas en ĝi oficisto parolanta Esperante, jen, en ĉi tiu folio, listo da personoj, kiuj estas pretaj vin akompani al tiu Informejo por utili al vi kiel tradukantoj. Pro tio ke vi estas instruisto, mi al vi konsilas vin turni al S^ro R., kiu estas licea profesoro kaj tre volonte parolas Esperante.

— Sinjoro, mi estas mirigata de via bonega organizo, kaj vi povas esti certa, ke mi klopodos ĉe miaj Esperantistaj samurbanoj por ke ili organizu tian Oficejon en nia urbo — Kiu estas Esperanto-Konsulo en via urbo?

— S^ro L., prezidanto de la Komerca Konsilantaro. Vi trovos lian adreson sur la jena folio. Li volonte akceptas Esperantistojn ĉiutage de la dek-unua ĝis la dek-dua horo. Se vi bezonas konatiĝi kun kelkaj personoj aŭ viziti ian ajn ne publikan lokon, li donos al vi la necesajn rekomendajn leterojn. Se vi ne bezonas liajn servojn, vi bonvolu meti vian vizitkarton en lian leterujon, laŭ la kutimo.

— Sinjoro, mi ne scias kiel mi dankos vin pro via gastameco. Dank' al vi, la vizito de via urbo estas por mi vera plezuro.

— Sinjoro, mi rimarkas, ke vi ne havas verdan stelon ĉe via butontruo, kaj tio estas grava manko, ĉar la ĉitieaj Esperantistoj neniel povos ekscii, ke vi estas Esperantisto.

— Mi volis aĉeti verdan stelon en mia urbo, sed mi ne sciis kie, ĉar la Esperantistoj mendas ilin el fremdlando.

— Tie ĉi, ni vendas steletojn kaj ĉiuspecajn Esperantajn komercaĵojn; plie ni havas ĉiujn ĵurnalojn, ŝlosilojn de Ĉefeĉ kaj ĉiujn necesajn lernilojn. Ĉiutage, multaj personoj venas al nia Oficejo por aĉeti Esperantaĵojn.

Ekz. 4^a. Ĉe la Esperanto-Oficejo.

— Bonan tagon, Sinjoro, mi estas fremda Esperantisto...

(*La tenisto per enlanda lingvo*): Mi ne parolas Esperanton. Jen folio kaj gvidlibro... (*Li donas ilin al la vojaĝanto, kiu trovas en ili la necesajn informojn*).

Ekz. 5a. Ĉe la Esperantista Hotelo.

— Sinjoro, mi venas al via hotelo, ĉar oni donis al mi vian adreson en la Esperanto-Oficejo.

— Estu bonvena, Sinjoro... bonvolu eniri la salonon kaj enskribi vian nomon sur la kajero de la vojaĝantoj. Ne forgesu ankaŭ skribi ĝin sur la speciala kajero de la trapasantaj Esperantistoj.

— Bona afero ! Sinjoro, mi vidis sur tiu kajero, ke en via hotelo nun estas du samideanoj ; vi bonvolos prezenti min al ili kaj doni al mi lokon apud ili ĉe la komuna tablo, se mi ne ĝenos tiujn sinjorojn.

— Volonte, Sinjoro. Mi jam vidis ilin kelkafoje en mia hotelo ; ili estos certe kontentaj konatiĝi kun vi. Atendante la vespermanĝon, vi trovos ĉi tie Esperantajn revuojn kaj ĵurnalojn en tiu speciala koverto.

Ekz. 6a. Ĉe la Esperantista Restoraciejo.

— Kelnero ! donu al mi Esperantan ilustraton !

— Jen, Sinjoro !

— Ĉu tien ĉi ne venas kelkafoje Esperantistoj ?

— Jes, Sinjoro ; Sro F. kaj Sro C. venas preskaŭ ĉiutage de la 1a ĝis la 2a horo.

— Dankon ; kiam ili envenos, bonvolu diri al ili, ke estas ĉi tie fremda Esperantisto, kiu deziras paroli al ili.

Ekz. 7a. Rekomenda letero de Konsulo.

En B..., 30an de Novembro 1908.

Sinjoro A..., Esperanto-Konsulo en B., rekomendas al la afableco kaj samideaneco de Sinjoroj ĉiulandaj Esperanto-Konsuloj, k.a., Sinjoron D., oficiston en la ĉitiea firmo G..., certigante, ke nia samideano D. estas tre honorinde konata en nia urbo.

Subskribo,
Stampo de la Konsulo.

Ekz. 8a. Ĉe la Esperanto-Konsulo.

— Mi petas vian pardonon, Sinjoro, se mi estas ĝenanto, sed mi estas kompostisto, dudekjara, kaj mi alvenas el mia urbo Dresdeno kaj dezirus trovi oficon en via urbo. Ĉar mi ankoraŭ tre malbone povas paroli per via nacia lingvo, mi estus al vi tre danka, se vi povus helpi al mi por

trovi la deziratan de mi oficon, kaj konigi al mi kelkajn samideanojn de via urbo. Jen estas rekomenda letero de la Esperanto-Konsulo en Dresdeno.

— Mi deziras al vi bonvenon en nia urbo, Sinjoro. Vi povos viziti mian sekretarion, Sinjoro F., al kiu ĉitiea presisto ĵus parolis pri bezonata nova kompostisto. Ĉar en tiu presejo, oni presas kelkafoje Esperantajn artikolojn por loka ĵurnalo, via scio de Esperanto povos esti utila kaj vi kredeble estos dungata. Sinjoro F. donos plie al vi ĉiujn aliajn informojn pri loĝado, pensiono, k. c. Se vi bonvolas ĉeesti nian venontan Esperantistan kunvenon, lundon proksiman je la oka vespere, mi vin revidos tie, mi prezentos vin al la ĉitieaj samideanoj, kaj vi bonvolos tiam diri al mi, ĉu ĉio sukcesis al vi en viaj klopodoj, aŭ ĉu mi povos ankoraŭ esti al vi utila.

Ekz. 9ª. Peto al Esperanto-Konsulo.

Torino, 25 Majo 1908.

Al Esperanto-Oficejo de Berno.
(Por Sinjoro Konsulo).

Tre Estimata Sinjoro,

Ĉar mi legis en la ilustrita gvidlibro de via regiono, disdonita en nia lasta Esperantista kunveno, ke estas en via regiono somerrestejoj kun nekostaj hoteloj, mi petas, ke vi bonvolu montri al mi lokon, altitudan je 1000 ĝis 1500 metroj, preferinde proksiman al arbaroj, se eble kun bela vidaĵo sur la montoj, kaj ne tro malproksime de fervojo. Mi dezirus pagi de 10 ĝis 12 Sm. ĉiutage por la tuta familio.

Kun m aj antaŭaj dankoj, akceptu la certigon de mia alta estimo.

G. Z. (Esperanto-Oficejo. Torino).

Ekz. 10ª. Respondo al peto pri informoj.

Berno, 1 Junio 1908.

Al Esperanto-Oficejo de Torino.
(Por Sinjoro G. Z.).

Tre Estimata Sinjoro,

Mi ĉi-kune sendas al vi la Esperante redaktitajn prospektojn de la pensionhoteloj de A., B., kaj C., vilaĝoj, en kiuj vi trovos sendube la

deziratan somerrestejon. Se tiuj prospektoj ne donas al vi sufiĉajn informojn, mi, post via peto, turnos min al la ĉitiea societo de la hotelistaro por ĉiuj komplementaj bezonataj informoj.

Altestime,

Por la Esperanto-Konsulo,
La Sekretario, N. L.

Ekz. 11ª. Komerca peto.

Kristianio, 1 Februaro 1908.

Al Esperanto-Oficejo de Mâcon.
(Por Sinjoro Konsulo).

Tre Estimata Sinjoro,

Leginte en la lasta Nº de « *Esperanto* », ke vi havis en via regiono tre bonan rikolton de vino, kaj leginte la mezajn prezojn en la artikolo publikigita de vi en la dirita gazeto, mi dezirus rilati kun bona firmo de via urbo por fariĝi ĝia riprezentanto ĉi tie. Vi bonvolu, se eble, havigi al mi konfidecajn informojn pri la kredito de la firmoj, kiuj estos montrataj de vi.

Bonvolu akcepti la certigon de mia alta estimo.

V.

Ekz. 12ª. Respondo al peto pri komerca afero.

Mâcon, 5 Novembro 1908.

Al Sinjoro V., Kristianio.

Tre Estimata Sinjoro,

Mi ĉi-kune sendas al vi la prospektojn kaj prezarojn de du ĉitieaj gravaj vinfirmoj. Ili estas konataj ĉi tie, kiel tre seriozaj firmoj, sed se vi volas havi pli precizajn informojn pri la kredito, kiun ili havas, vi nur bezonas vin turni al la agentejo D., sendante 2 Sm. Vi povas skribi vian leteron Esperante, ĉar tiu firmo (kiel cetere la vinfirmoj, kies adresojn mi sendas al vi) estas ano de la komerca sekcio de nia grupo kaj regule sin turnas al ni por tradukigi siajn leterojn.

Altestime,

La Esperanto-Konsulo.
M.

Ekz. 13a. Peto pri katalogo.

Stokholmo, 10 Junio 1908.

Al Sinjoro N., en San Sebastian,

Leginte vian anoncon en la gvidlibro de la urbo San Sebastian, disdonita en la lasta ĉitiea ekspozicio esperantista, mi petas, ke vi bonvolu sendi al mi viajn katalogojn kaj prezarojn, se eble, Esperante redaktitajn

Altestime,

H.

Ekz. 14a. Ligo de la Esperantistaj aĉetantoj.

Wien, 4 Marto 1908.

Al Esperanto-Oficejo de Tokio.
(Por Sinjoro R.).

Estimata Sinjoro.

Estante ano de la Tutmonda Ligo de la Esperantistaj aĉetantoj (1) kaj ne sciante la japanan lingvon, mi petas, ke vi bonvolu sendi al mi vian prezaron pri silkaj teksaĵoj.

Altestime,

H.

---

(1) *Vidu artikolojn pri tiu Ligo en Noj 7, 9, 15 de* « Esperanto » (*1907*).

RESPONDILO.

URBO : LANDO :

1° ESPERANTO-KONSULO.

Nomo de la Konsulo .....

Adreso de la Konsulo .....

Maniero de elekto de la Konsulo { Per elekto de la grupanoj (1) / Per elekto de grupestraro / Per privata iniciato.

2° ESPERANTO-OFICEJO.

Adreso de la Esperanto-Oficejo .....

Kion oni vendas en la Esperanto-Oficejo ? .....

.....

.....

Ĉu oni povas aboni Esperantajn gazetojn per via Oficejo ? .....

Ĉu en ĝi estas afiŝejo ? .....

Ĉu sur la fenestrego de la Oficejo estas la surskribo *Esperanto-Oficejo?*

.....

.....

Ĉu ĝi alprenis la komunan adreson *Esperanto-Oficejo en X.* (nomo de l' urbo) ? .....

.....

3° ALDONO.

Ĉu vi eldonis aŭ intencas eldoni folieton disdonatan en la Oficejo al la trapasantaj fremdaj Esperantistoj ? .....

Ĉu vi eldonis aŭ intencas eldoni allogantan gvidlibron de via regiono disdonatan ĉiulande ? .....

.....

Ĉu la Konsulo aŭ alia persono prenas sur sin la tradukadon de ĉiuj leteroj ? .....

4° ALDONAJ INFORMOJ KAJ RIMARKOJ.

Subskribo,

(1) *Forstreku la nelaŭgajn vorlojn.* *Turnu.*

Plenigu tiun folion kaj sendu ĝin kiel eble plej baldaŭ al ESPERANTO, 8, Rue Bovy-Lysberg. Genève (Svisujo).

RESPONDILO.

URBO : LANDO :

1° ESPERANTO-KONSULO.

Nomo de la Konsulo .....

Adreso de la Konsulo .....

Maniero de elekto de la Konsulo { Per elekto de la grupanoj (1) / Per elekto de grupestraro / Per privaţa iniciato.

2° ESPERANTO-OFICEJO.

Adreso de la Esperanto-Oficejo .....

Kion oni vendas en la Esperanto-Oficejo ? .....

.....

.....

Ĉu oni povas aboni Esperantajn gazetojn per via Oficejo ? .....

Ĉu en ĝi estas afiŝejo ? .....

Ĉu sur la fenestrego de la Oficejo estas la surskribo *Esperanto-Oficejo?*

.....

Ĉu ĝi alprenis la komunan adreson *Esperanto-Oficejo en X.* (nomo de l' urbo) ? .....

.....

3° ALDONO.

Ĉu vi eldonis aŭ intencas eldoni folieton disdonatan en la Oficejo al la trapasantaj fremdaj Esperantistoj ? .....

Ĉu vi eldonis aŭ intencas eldoni allogantan gvidlibron de via regiono disdonatan ĉiulande ? .....

.....

Ĉu la Konsulo aŭ alia persono prenas sur sin la tradukadon de ĉiuj leteroj ? .....

4° ALDONAJ INFORMOJ KAJ RIMARKOJ.

Subskribo,

(1) *Forstreku la netaŭgajn vortojn.* *Turnu.*

Plenigu tiun folion kaj sendu ĝin kiel eble plej baldaŭ al ESPERANTO, 8, Rue Bovy-Lysberg. Genève (Svisujo).

Ĉiuj Esperanto-Konsuloj nepre devas legi

★ ESPERANTO ★

Duonmonata Internacia Gazeto

Komuna organo de ĉiuj Konsuloj, Esperanto-Oficejoj, Informejoj, Agentejoj, Peresperantaj Societoj, k. a.

Esperanto, kontraŭ jara helpabono da 4 Sm., enpresas sen plia pago ĉiujn oficialajn informojn de la *Esperanto-Konsuloj* (kreo, organizo, specialaj servoj farataj de ili, k. c.), kaj la anoncojn de la personoj, kiuj petas la servojn de la Esp.-Of.

Esperanto, kontraŭ jara helpabono da 4 Sm., enpresas sen plia pago ĉiujn oficialajn komunikojn de la Esperanto-Societoj, grupoj, kluboj, k. t. p.

Esperanto publikigas regule la nomojn de la novaj Esperanto-Konsuloj, informas pri la kreo de ĉiuj oficejoj, informejoj, agentejoj, k. t. p., sciigas pri ĉiuj praktikaj aplikaĵoj de Esperanto.

Esperanto sendas senpage ĉiujn informojn al la Esperanto-Konsuloj, kiuj petas konsilojn kaj informojn.

Jara abono: 1.20 Spesmiloj.
Unu numero: 4 Spesdekoj.

Direkcio: *8 Rue Bovy-Lysberg* — **Genève** (*Svisujo*).

Fama ĉefverkaĵo:

VIVO DE JESUO DE ERNEST RENAN

elfrancigis **Emilo Gasse**, P. A. S. F. P. E.

En francujo fr. 2,75, alilande fr. 2,90 (sm. 1,15)
(rabato 33 1/3 °/₀ al la E.-Oficejoj).

La SOLE INTERNACIA SIGNO

estas la Verda Stelo « GASSE »

SESA JARO. Uzata de nia Majstro.

Pingloj kaj broĉoj:	fr. 6 po 10, unua prezo ĉe la E. O.	fr. 0,80
Kravataj pingletoj:	fr. 4 po 10, dº	fr. 0,55

Sin turni al: **Emilo GASSE**, *77, r. Ernest-Renan, Havro* (*Francujo*).

PROPAGANDILOJ «ĈEFEĈ».

Esperantaj Ŝlosiloj en Angla, Franca, Germana, Itala, Hispana, Sveda, Dana, Portugala, Hungara, Bohema lingvoj... 1 ekz. *0 02 sm.*; 100 ekz. *1.40 sm.*

Esperantaj « Tutoj », metodoj por lerni Esperanton sen instruisto, eldonitaj en Angla, Franca, Germana, Itala, Hispana kaj Sveda lingvoj... 1 ekz., *0.04 sm.*; 100 ekz. *3 sm.*

La Universala Ŝlosilaro, bele bindita poŝlibreto enhavanta unu ekzempleron de ĉiuj el la ĝis nun eldonitaj ŝlosiloj, *1 ekz. 0.60 sm.*

POŜTKARTOJ PROPAGANDAJ EN DU ELDONOJ:

1ª kun franca, angla, hispana kaj sveda tekstoj } 100 ekz., 0.60 sm.
2ª kun germana, itala, hungara kaj portugala tekstoj } 1000 ekz., 5.00 sm.
Kovertoj kun oklingvaj tekstoj, 100 ekz., 0.80; 1000 ekz., 7.00 sm.

LA ESPERANTISTAJ SIGNOJ EN TRI FORMATOJ:

Nº 1. — Kravatpingloj kun simpla emajlita verda steleto.
1 ekz., 0.16 sm.; 10 ekz., 1.30 sm.

Nº 2. — La simpla stelo sen akraj pintoj, el herboverda diafana emajlo sur gilošita fundo, *luksa nealtruda juvelo* por ĉiutaga portado.

a. Kun pinglo
b. broĉforma } 1 ekz., 0.20 sm.; 10 ekz., 1.60 sm.
c. butontrua — 1 ekz., 0.26 sm.; 10 ekz, 2.00 sm.

La saman nº 2ª kun pinglo kaj surskribo « Esperanto, Kongreso en Cambridge, 1907 », ni liveras je sama prezo, 1 ekz., 0.20 sm.

Nº 3. — La sama stelo, **ankoraŭ pli luksa**, kun randa ĉirkaŭskribo « *Esperanto, Lingvo Internacia* » sur nigra fundo kaj kun orumitaj interspacoj, por esti portata ĉe internaciaj kunvenoj kaj kongresoj.

a. Kun pinglo
b. broĉforma } 1 ekz., 0.32 sm.; 10 ekz., 2.60 sm.
c. butontrua — 1 ekz., 0.40 sm.; 10 ekz., 3.20 sm.
d. ĉenpendaĵo — 1 ekz., 0.80 sm.; 10 ekz., 6.40 sm.

Ni ĉiam sendas **afranke** *ĉie en la mondo.*

Internacia Propagandejo Esperantista,
MERTON ABBEY, LONDON, S. W.

ĴUS APERIS

ĈE LA SAMA ELDONEJO:

Tutmonda Anekdotaro, (kajero unua), kolekto de mallongaj spritaj rakontoj. la plej taŭga kaj la plej malkara legolibro por kursoj, kunvenoj, k. t. p.

Afranke 1 ekz, 0.08; sm.; 100 ekz., 5.00 sm.

Librairie de l'Esperanto

Internacia Esperantista Librejo 15, rue Montmartre, PARIS.

Ni vendas ĉiujn librojn esperantajn, kaj ĉiujn librojn ne esperantajn. Ni akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo. Ni aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto. Ni ĉiam ekzamenas volonte proponojn pri eldono de libroj aŭ broŝuroj.

Ni rekomendas la jenajn verkojn:

Tre bela tromplogilo, de L. de Beaufront (prezo: Fr. 0,15).

Propaganda broŝuro, en kiu Sro de Beaufront kompetente refutas la argumenton, laŭ kiu la lingvo internacia estus pli facila, se ĉiuj vortoj estus tuj kompreneblaj de la kleruloj, sen antaŭa studo.

Pri la elparolado de Esperanto, de Gaston Moch (prezo: Fr. 1,—).

Plena studo pri la silaba divido de la vortoj, la tonika akcento, la elparolo de r, kz, ng, nk, pri la vokaloj k. t. p.

Solo de Fluto, monologo, de P. Bilhaud, trad. F. Doré (prezo: Fr. 0,60).

Tre amuziga monologo. Por ludi ĝin, oni bezonas fluton, sed oni ne bezonas koni la flutludon.

Kial ili estas famaj ???, monologo, de Georges Feydeau, trad. F. Doré (prezo: Fr. 0,50).

Oni pruvas en tiu monologo, ke Stephenson, Parmentier, Gutenberg, Kristoforo Kolumbo, eĉ Dro Zamenhof ne meritis la famecon, sed ke, male, la monologanto estas efektive faminda!

Fonetiko litera, de M. Verema (prezo: Fr. 0,50).

Interesa studo pri la elparolo de la konsonantoj en Esperanto.

Nia plena katalogo (24-paĝa) estas sendata senpage al ĉiuj personoj, kiuj postulas ĝin por si aŭ por siaj amikoj.

L'ESPERANTISTE

Monata organo de la Societo franca por la propagando de Esperanto.

24 paĝoj (18×26) da teksto, 12 paĝoj da kovrilo.

Tiu interesa ĵurnalo, lerte direktata de Sro L. de Beaufront enhavas interesajn artikolojn kaj kronikojn en Esperanto kaj franca lingvo.

Prezo de la abono:

en Franclando Fr. 3,—, ekster Franclando Fr. 3,50.

Por la abonoj sin turni al la « Librairie de l'Esperanto ».